Johann Wolfgang von Goethe,

Paska promeno

tradukita de Georg Schmidt

Glaciolibere riveroj nun estas
per printempa viviga ĉarm-atmosfer':
en valo verdiĝas feliĉo-esper';
vintro retiris sin kaj kaŝrestas
malforte en kruda monto-aer'.
De tie ĝi sendas, fuĝante, per
la vent' senpotence grajnforman glacion
en strioj al verdiĝanta ter';
sed sun' ne toleras blankan ion.
Ĉie ekmovo por streĉi, formigi,
ĉion volas koloroj vivigi;
Floroj en kamp' ne jam montras sin,
belvesta homar' anstataŭas ilin.
Turnu vin, por de sur ĉi tiu altaĵo
revidi al la urba tutaĵo.
El pordo malhela, mur-elbora.
penetras amaso multkolora.
Ĉiujn ĝojigas la suna or':
Ili festas viviĝon de l' Sinjor',
ili mem ja viviĝis el penoj,
el malaltaj domoj, loĝejoj malbonaj,
el metiaj kaj oficaj katenoj,
el prem' de tegmentoj altfrontonaj,
el premega malvasto de la stratetoj,
el honorinda nokt' de l' preĝejo
ĉiuj troviĝas en plenlumejo.
Kiel rapide tra ĝardenetoj
kaj kamp' la homaro sin dividas.
kaj sur river', en longo kaj larĝo.
multajn gajajn boatojn vi vidas;
la lasta ŝipo, sub troa ŝarĝo
dronante preskaŭ, nun glitas for.
El monta eĉ krutvoja mallarĝo
briletas belvesta multkolor'.
Jam bruas homa multparolo,
jen estas ĉielo por popolo,
kontenton resonas ĝojega kri':
Tie ĉi hom' povas esti mi!

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

Osterspaziergang

Vom Eise befreit sind Strom und Bäche
Durch des Frühlings holden, belebenden Blick;
Im Tale grünet Hoffnungsglück;
Der alte Winter, in seiner Schwäche,
Zog sich in rauhe Berge zurück.
Von dorther sendet er, fliehend, nur
Ohnmächtige Schauer kornigen Eises
In Streifen über die grünende Flur;
Aber die Sonne duldet kein Weißes,
Überall regt sich Bildung und Streben,
Alles will sie mit Farben beleben;
Doch an Blumen fehlt's im Revier
Sie nimmt geputzte Menschen dafür.
Kehre dich um, von diesen Höhen
Nach der Stadt zurückzusehen.
Aus dem hohlen finstern Tor
Dringt ein buntes Gewimmel hervor.
Jeder sonnt sich heute so gern.
Sie feiern die Auferstehung des Herrn,
Denn sie sind selber auferstanden,
Aus niedriger Häuser dumpfen Gemächern,
Aus Handwerks- und Gewerbesbanden,
Aus dem Druck von Giebeln und Dächern,
Aus der Straßen quetschender Enge,
Aus der Kirchen ehrwürdiger Nacht
Sind sie alle ans Licht gebracht.
Sieh nur, sieh! wie behend sich die Menge
Durch die Gärten und Felder zerschlägt,
Wie der Fluß, in Breit und Länge
So manchen lustigen Nachen bewegt,
Und bis zum Sinken überladen
Entfernt sich dieser letzte Kahn.
Selbst von des Berges fernen Pfaden
Blinken uns farbige Kleider an.
Ich höre schon des Dorfs Getümmel,
Hier ist des Volkes wahrer Himmel,
Zufrieden jauchzet groß und klein:
Hier bin ich Mensch, hier darf ich's sein!

. . .

Traduko de la Germana poemo "Osterspaziergang" de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Georg Schmidt.*

Arg-819-1643 (2013-02-05 10:42:56)

La traduko troviĝas en la revuo „Heroldo de Esperanto", n-ro 13 (770), dekkvina jarkolekto, eldonaĵo de l' 1-a de aprilo 1934. [Redaktoroj: Teo Jung kaj Joseph Ferdinand Berger]. Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la retejo `http://www.literaturo.dk/novaj.htm`*, kiun verkis s-ro Lars Kromann, Danio.*

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

MR-483-01 / Arg-819-1642 (2013-02-05 10:24:46)

Tiu ĉi poemo troviĝas en la verko „Faŭsto, parto 1-a", ĉapitro „Nokto" (Faust, 1. Teil, Kapitel „Nacht") de J. W. Goethe.